Den Ergebnissen dieser Studien können wir entnehmen, dass Bildungseinrichtungen die Möglichkeit noch unterschätzen, soziale Netzwerke für die gezielte Entwicklung von Lehrprogrammen für junge Menschen zu nutzen. Die Befragten bezeugen die hohe Popularität der Nutzung sozialer Netzwerke, aber auf der anderen Seite interessieren sie sich meistens nur für unterhaltsame Kommunikation mit Freunden. Bildungseinrichtungen könnten soziale Netzwerke als Kommunikationskanal nutzen, um mit ihren Schülern zu kommunizieren und dadurch ihr Engagement im Rahmen der Schule / Universität zu fördern, und das Interesse der Studenten für alternative Bildungsangebote zu erhöhen. Schüler und Studenten könnten auf diese Weise neues Wissen erwerben, ihre Fähigkeiten teilen, ihre digitalen Kompetenzen erweitern, akademische Unterstützung erhalten, in der akademischen Ausbildung zusammenarbeiten und auch von ihren Kollegen lernen. Sie könnten durch das Netzwerk ihre Freunde über ihre Studienleistungen informieren, Wettbewerbe organisieren, Kommunikation und Zusammenarbeit mit potenziellen Partnern entwickeln, Themen mit ihnen erstellen und diesbezüglichen Diskussionen folgen, und somit ihre Persönlichkeit gestalten. Mittelschulen, Hochschulen und Universitäten sollten die Unterstützung staatlicher Institutionen in Erwägung ziehen, und damit eine experimentelle Umsetzung von sozialen Netzwerken als Hilfsmittel im Fernunterricht. Sie sollten ihre Präsentation in sozialen Netzwerken erweitern und stärken, Nutzung sozialer Netzwerke als Hilfsmittel für die Erstellung und Präsentation von Workshops zu spezifischen Themen fördern. Informelle Bildungs-

anbieter könnten die Kommunikation im Umfeld von sozialen Netzwerken unterstützen und erweitern, um Schulungen mit nicht-traditionellen Methoden im Einklang mit Möglichkeiten von sozialen Netzen anzubieten und zu präsentieren, Menschen für Online-Bildung zu motivieren und zu mobilisieren, so dass der Erwerb von Wissen zur populären sozialen Aktivität werden könnte.

Schrifttum

Poláková, Eva (2013): *Možnosti a nebezpečenstvá oline komunikácie/Ebloj kaj danĝeroj de retkomunikado*. En: Barandovská, V. (eld.): Littera scripta manet. Serta in Hnonorem Helmar Frank. Paderborn: Akademia Libroservo p. 566-576

Poláková, Eva. – Masaryková, Zuzana (2011): *Etika mediálnej komunikácie v on-line prostredí.* Trnava: Fakulta masmediálnej komunikácie UCM Trnava

Poláková, E. et. al. (2013): *Internetová komunikácia, príležitosti a riziká.* Banská Bystrica: Belianum

Henrikson, Jenise Uehara (2011): The Growth of Social Media: An Infographic. (30**.** august 2011) En://www.searchenginejournal.com/growth-social-media-2-0-infographic/77055/

Social Media: Facts and Statistics You Should Know in 2014. En: http://www.jeffbullas.com/2014/01/17/20-social-media-facts-and-statistics-you-should-know-in-2014/#MsvIHYS6fxxmS8HP.99

Social Media 2014: Statistics – an interactive Infographic you've been waiting for! En: http://blog.digitalinsights.in/social-media-users-2014-stats-numbers/05205287.html

Msn.com *(*29. 3. 2011): *Docs warn about teens and 'Facebook depression'.* En: <http://www.msnbc.msn.com/id/42298789/ns/health-mental_health/t/docs-warn-about-teens-facebook-depression/#.T8XZKFJe-WZ>

Retrevo.com (2010.15.3): Is Social Media a New Addiction? En: <http://www.retrevo.-com/content/node/1324>

Site Pro News (07 2013 Thursday): The Latest Social Syndrome: The Fear of Missing Out. En: http://www.sitepronews.com/2013/07/11/the-latest-social-syndrome-the-fear-of-missing-out/

DESI - Index digitálnej ekonomiky a spoločnosti 2015. Profil krajiny Slovensko. Európska komisia - Tlačová správa Brusel, 24 február 2015, en: http://europa.eu/rapid/press-release_IP-15-4475_sk.htm

ITNEWS (20.03.2015): http://www.itnews.sk/spravy http://www.itnews.sk/spravy/tlacove-spravy/2015-03-20/c168137-prieskum-internet-pouzivaju-dve-tretiny-slovakov

www.eskills.sk (24.9. 2014) **:** *Správa IT FITNESS TEST 2014 v SR.* En: http://www.eskills.sk/static/files/eskills_sprava_2014.pdf

Eingegangen 2015-04-06

Anschrift der Verfasserin: Prof. Dr. Eva Poláková, Pedagogická fakulta Univerzity Mateja Bela v Banskej Bystrici, Ružová 13, 974 11 Banská Bystrica (SK).
Mail: epolakret@gmail.com

Sociaj retoj kaj ilia perspektiva uzo en edukado (Resumo)

Sociaj retoj iĝis integra parto de la virtuala komunikado, ĉar ili alportas al siaj uzantoj multajn avantaĝojn, precipe dum akirado de informoj el la ĉiutaga vivo. Ankoraŭ nesufiĉe ili estas uzataj por profesiaj celoj, krome en la merkatiga kampo. La potencialon de sociaj retoj oni tamen kun sukceso povus uzi ankaŭ en edukado, nome en ambaŭ tipoj de edukaj sistemoj, formala kaj en neformala. En tiu kazo estus bezonata solida kaj detala analizo de bezonoj kaj motivigo de la celgrupoj; klerigaj kursoj devintus esti konstruitaj „laŭmezure", t. e. laŭ specifaj bezonoj de konkretaj grupoj. En la kampo de entreprenado jam pruviĝis sukcesa enkonduko de konformaj programoj helpe de sociaj retoj, do analogie ankaŭ la edukaj-klerigaj programoj povus esti distribuitaj ĝuste per sociaj retoj.

grkg / Humankybernetik
Band 56 · Heft 2 (2015)
Akademia Libroservo / IfK

Enkonduko al influoj de Ferdinand de Saussure sur la esplorkampo pri helplingvoj

de Paulo Pereira NASCENTES, Braziljo-DF (BR)

Eseo el Postdiplomaj studoj de interlingvistiko, Universitato Adam Mickiewicz, Poznań (PL)

1. Enkonduko

Fonda kaj fundamenta, la tre konata verko de Ferdinand de Saussure, nome *Kurso pri Ĝenerala Lingvistiko* (2006, originale 1916) lanĉas novan rigardon sur la kampo de lingvaj studoj, tiam sub la influo de novaj sciencaj perspektivoj en Antropologio, laŭ la *strukturalisma metodo* de Claude Lévi-Strauss. Konsiderata la 'patro' de moderna Lingvistiko, Saussure ĝis nun ricevas pri siaj pioniraj lingvaj ideoj akuratajn studojn kaj interpretojn de diversaj fakuloj.

La termino *Interlingvistiko* kiel scienco aperas en la artikolo "Une science nouvelle" (nova scienco) de la lingvisto Jules Meysmans, publikigita en 1911. Klopodoj konstrui *artefaritan* venas tamen de antikvaj tempoj kaj "floris dum renesanco, sed ne ligite ekskluzive kun lingvistiko aŭ eĉ kun aparta scienco kiel interlingvistiko." (Barandovská-Frank, 2014, 1-a parto). Post diversaj esploroj kaj kontribuantoj daŭre de multaj jaroj ĝis nun, pluraj publikaĵoj, kongresoj, simpozioj kaj lingvaj asocioj, interlingvistiko plifirmiĝis kaj ampleksiĝis sia intereskampo, ekzemple, al *lingvotipologio kaj lingvokomparado, planlingvoj, helplingvoj* k.s. Famaj lingvistoj kaj universitataj profesoroj ĝin pritraktis laŭ diversaj perspektivoj.

La celo de ĉi tiu laboraĵo estas konstati, ĉu spuroj de la kernaj ideoj de Saussure, plus la 'legaĵoj' kaj 'relegaĵoj' de lia verko (2006, 2012) laŭ diversaj fakuloj (Arrivé, 2007; Beividas, 2008), ankoraŭ gravas aŭ ne por esploroj kadre de interlingvistiko. Krome, pro tio ke, ekzemple, Esperanto estas *aposteriora* planlingvo, kiu do prunteprenas lingvajn elementojn de ekzistantaj lingvoj, certe videblas en ĝi la famaj principoj kaj dikotomioj saŭsuraj. Tiurilate, Esperanto verŝajne estas unika inter diversaj helpolingvoj, pro kelkaj trajtoj de ĝia tielnomata *skemismo*, ekzempligita de la korelativa tabelvorto. Indas esplori ankaŭ alian verŝajnan unikaĵon de Esperanto kadre de planlingvoj, t. e., ĝia *aglutineco* kaj ĝia *sistemo* pri vortofarado, certe favora al multaj azianoj kaj ne-eŭropanoj, laŭ iliaj propraj *izolaj/aglutinaj* etnolingvoj. Tiuj trajtoj apenaŭ pritraktiĝu, ĉar necesas plia studo pri ili.

Laŭ la eldono de ni uzata, post komento pri la neevitebla evoluo de ĉiuj lingvoj pro la *principo de arbitreco* de la lingva signo, Saussure (2006: 91) defendas, ke "eĉ en artefaritaj lingvoj tiu principo nepre devas validi". Kaj tekste tiel li sekvas:

"Quem cria uma língua, a tem sob domínio enquanto ela não entra em circulação; mas desde o momento em que ela cumpre sua missão e se torna posse de todos, foge-lhe ao controle. O esperanto é um ensaio desse gênero; se triunfar, escapará à lei fatal? Passado o primeiro momento, a língua entrará muito provavelmente em sua vida semiológica; transmitir-se-á segundo leis que nada têm em comum com as de sua criação reflexiva, e não se poderá mais retroceder"[1]. (*Op. cit.*).

Verŝajne tiu esplorvojo montriĝas promesplena je freŝaj ebloj, (1) ĉar *Cours de linguistique générale CLG* (1916) ĝis nun surprizigas fakajn legantojn per senfina potencialo generi novajn interpretojn, lume, ekzemple, de tio ke, "en 1966, estis trovitaj novaj manuskriptoj de Saussure, publikigitaj en 2002, sub la titolo *Escritos de linguística geral* (Skribaĵoj de ĝenerala lingvistiko), jam tradukitaj en la portugalan (Cultrix: 2004)[2]". Tiu informo troviĝas en la instiga recenzo de Beividas (2008: 349-356) pri la libro de Arrivé (2007); (2) pro la daŭre rekonata graveco kaj de la famaj "dikotomioj de Saussure" kaj de ĝiaj interpretoj laŭ aŭtoroj de psikanalizo, lingvistiko, semiotiko, kiaj Freŭd, Saussure, Hjelmslev, Lacan (laŭ Arrivé, 1994), eblas supozi, ke tiuj principoj ne devus esti neglektataj, se temi pri "la problemaro de planlingvoj", esenca laborkampo de interlingvistiko, laŭ Blanke.

Kiel ekzemplo de revizio pri antaŭaj 'mitoj', Beividas (2008) emfazas, ke Saussure neniam preterlasis la gravecon de la 'parolo' en la 'diskurso de subjekto', certe esenca en la psikanaliza laborkampo. Aldone, ankaŭ eblas supozi, ke (3) la *principo de arbitreco* de lingvaj signoj, kiu kelkaj aŭtoroj etendiĝas de *'signifiant'* al *'signifié'*, rolas grave en linvokreado, precipe en konstruado de *aposterioraj* planlingvoj, pro tiu menciita deveno de leksikaj unuoj el vivantaj lingvoj. Ne nur tio, ankaŭ la analizo de ties gramatika strukturo montras tion, ke la kerno de la greka tradicio ne tiom ŝanĝiĝas, sed male nur konstateblas varioj pri vortofinaĵoj, elekto de malsamaj pronomoj, prepozicioj, numeraloj. Tamen, restas nevaria la ekzisto de la samaj tradiciaj vortoklasoj. Facile videblas tio per la *specimenoj de tekstoj* de Interlingua (Barandovská-Frank, 2014, 6-a parto: 4), Occidental (*Idem.* 7-a parto: 4), Novial kaj Occidental, (*Idem.* 8-a parto: 2). Pri tiuj du lastaj menciindas, ke "ambaŭ aŭtoroj, parolante ĉiu en sia propra interlingvo, komprenis sin reciproke tre bone." Fakte simpla komparo de ambaŭ tekstoj montras, kiom relative similaj ili estas.

2. Langue /parole

Passini (2008: 64), emfazas, ke *"antes mesmo de Saussure, Zamenhof teve a intuição, sentiu a realidade da langue / parole e, embora não a explicitasse em termos*

[1] Laŭ mia libera traduko: *"Kiu kreas lingvon, havas ĝin sub kontrolo dum ĝi ne eniras en cirkuladon; sed ekde la momento, kiam ĝi plenumas sian mision kaj fariĝas ĉies posedaĵo, ĝi forfuĝas al kontrolo. Esperanto estas eseo de tiu specaro; se ĝi triumfos, ĉu ĝi eskapos al la fatala leĝo? Pasita la unua momento, la lingvo eniros tre probable en sian semiologian vivon; ĝi dissendiĝos laŭ leĝoj, kiuj havas nenion similan al tiuj de sia refleksiva kreaĵo, kaj ne plu povos malantaŭeniri".*

[2] Portugale: "em 1966, foram encontrados novos manuscritos de Saussure, publicados em 2002, sob o título *Escritos de linguística geral* (Skribaĵoj de ĝenerala lingvistiko), já traduzidos ao português".

teóricos, revelou-a seguramente na prática"[3]. Kaj por evidentigi tion, li portugale citas la subajn vortojn de Zamenhof (1963: 48). Tamen, la samaj vortoj esperante legeblas:

"Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, *ĝi ne devos* forigi *aŭ* ŝanĝi *la diritan formon, sed ĝi povas proponi formon* novan, *kiun ĝi rekomendos uzadi* paralele *kun la formo malnova. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos* arĥaismo, *kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo"*[4]. (Zamenhof: 2007, 1991: 48). ***Miaj esperantigo kaj kursivigo***.

Evidentiĝas tio, ke la sistemo (*'langue'*) evoluas, sed laŭ sociaj dinamikoj, ĉar ĝi ekzistas en la menso de la uzantaro laŭ konvencio delonge implicite akceptita de ĉiu lingvano, kiu ne rajtas eĉ ne povas, *per se*, 'forigi aŭ ŝanĝi formojn', malgraŭ tio, ke dum ĝia konkreta uzado kadre de specifaj, lokaj, historiaj cirkonstancoj (*'parole'*), oni fakte, kaj plejparte nekonscie, ja kontribuas al la lingva evoluo. Tamen, pri konkurencaj variantaj formoj decidos, lastanalize, la lingvokomunumo mem dum certa tempo. Akademiaj aktoj kaj la forto mem de la instrusistemo povos kunlabori favore al la fiksado de kelkaj formoj konsiderataj prestiĝaj anstataŭ aliaj.

Planlingvoj *aposterioraj* kiaj Volapük, Esperanto kaj Ido baziĝas sur la aro de gramatikaj elementoj de la originaj lingvoj, el kiuj devenas do ne nur la leksiko, sed almenaŭ parte la reguloj mem de ties strukturoj fonetika, morfologia, sintaksa kaj eĉ vortosencoj. Kompreneble la uzo mem far de la internacia komunumo influos ĉiujn tiujn lingvojn, kiuj sukcesos trapasi la fazon de lingvoprojekto kaj *eniros tre probable en sian semiologikan vivon*, laŭ la saŭsura esprimo. Historie, nur multaj jaroj post ilia kreado, eblos klare scii pri kiuj formoj postvivis kaj kiuj pereis. Hipotezoj kaj konjektoj pri tiu fenomeno venos el la verkaro de studemuloj, sed la fakto estas, ke verŝajne la jam cititaj principoj kaj aliaj trovotaj regos la evoluon simile al tio, kio okazas al iu ajn lingvo, ĉar la sociaj fortoj kaj ties dinamiko daŭras ĉu eksplicititaj ĉu ne.

Tion dirite, specife en la kazo de Esperanto, pliaj studoj povos montri, ĉu kelkaj sistemaj apartaĵoj de la Lingvo Internacia povos aŭ ne determini specialajn movojn. Ekzemple, ni konsideru, krom la Fundamento mem, tion, ke unu el la plej fruktodona subsistemo de Esperanto estas ĝuste la vortofarado, kiu ebligas la uzon de memstarajn vorterojn, kiajn, ekzemple, afiksojn, kies signifo estas relative sistemaj, aŭ kombino de du aŭ pliaj vortoradikoj en kunmetaĵoj k.t.p. Tio verŝajne evidentigas ion antaŭvidite de Zamenhof mem, t. e., unuflanke la *konstanta pliboniĝado kaj perfektiĝado* kaj aliflanke la eblo adaptiĝi al novaj bezonoj per la rimedoj de la 15ª Regulo de la *fundamenta gramatiko.* Kiel ekzemplo estu la primitiva adverbo *antaŭ*, el kiu regule venas *antaŭe,*

[3] "Antaŭe mem ol Saussure, Zamenhof havis la intuicion, sentis la realon de *langue / parole* kaj, malgraŭ ne ĝin eksplicitigis laŭ teoriaj terminoj, ja ĝin montris praktike".

[4] Portugale: *"Se algum centro institucional, que tiver autoridade, achar que essa ou aquela palavra ou regra em nossa língua for demasiadamente inoportuna, ele não deverá banir ou mudar a aludida forma, mas deverá propor uma nova forma, a qual recomendará seja usada paralelamente com a antiga. Com o tempo, a forma nova, pouco a pouco, marginalizará a forma antiga, que se tornará um arcaísmo, conforme vemos em todas as línguas naturais"*.

antaŭa. Aŭ ni konsideru ekzemplojn de kunmetaĵoj tute faritaj el afiksoj, *v.g., aĉaĵaro* (senorda aro da senvaloraĵoj), *aĵereto.* Angle, tiel tekstas la 15ª Regulo:

"*The so-called 'foreign' words, i. e. words which the greater number of languages have derived from the same source, undergo no change in the international language, beyond conforming to its system of ortography. – Such is the rule with regard to primary words, derivatives are better formed (from the primary word) according to the rules of the international gramar, e. g.* teatr'o, 'theatre', *but* teatr'a, 'theatrical', *(not* teatrical'a), etc." (Zamenhof, 2007: 61).

Certe al novaj kaj pli ampleksaj kaj kompleksaj konceptoj venas diversaj lingvistoj dum teoriaj studoj. Ĉu eblas alveni al "tripartigo, teorie klariga kaj metodologie utila, kun deirpunkto en koncepto monista de la lingvaĵo kaj havante ĝin ĉiam estanta"? Pri la klasika dikotomio *langue/parole* staras profunda diskuto de Coseriu (1987) pri du sinsekvaj partoj de la unua ĉapitro ("Sistemo, normo kaj parolo"), nome "II. Malkoherecoj kaj kontraŭdiroj de la vortigoj pri *lingvo* kaj *parolo*" kaj "III. Nesufiĉo de la saŭsura dikotomio" (1987: 18-50). La unua parto de tiu unua ĉapitro interalie dialogigas tri lingvistojn, nome Hjemslev, Martinet kaj Humboldt. Laŭ Humboldt, (*apud* Coseriu, 1987: 18):

"*Konkrete, nur ekzistas parolagoj* **(Sprechakte),** *nur ekzistas la parolo* **(das wirkliche Sprechen, das Gespräch),** *la lingva aktivaĵo* **(Sprechtätigkeit);** *aktivaĵo, kiu estas samtempe individua kaj socia, kiu estas per si mem nesistema, ĉar estas porĉiama kreado de nova-specaj esprimoj rilataj al nova-specaj intuicioj, kaj ene de kiuj la distingo de sistemo plimalpli estabila ne signifas pruvon de alia realo, malsama al parolagoj, sed konstituas nur nepran sciencan abstraktaĵon, pro studo de la lingvaĵo, kiu transiru la registron kaj analizon de la parolagoj kaj povu starigi historion".* [5](*Idem, ibid.*: 18).

Tion antaŭvidis Humboldt, kiam li asertas, ke "la lingvaĵo estas **enérgeia (*Tätigkeit,*** 'aktivaĵo') kaj ne **érgon (Werk,** 'produkto')" (*Idem, ibid.: 18*). En la dua kaj tria partoj de la unua ĉapitro, Coseriu resumas teoriojn de Jespersen, Gardiner Palmer, Bally, Porzig, Sèchehaye, Brøndal, Wartburg kaj pluraj aliaj por pravigi sian propran tielnomatan "kohera teorio de la parolo kaj de ĝia formaligo", tiu tripartigo menciita en la titolo de la ĉapitro, t. e., *sistemo*, *normo* kaj *parolo*, kun malsama signifo rilate al tiuj du originalaj de Saussure: *'langue' (sistemo)* kaj *'parole' (parolo).* Ne malofte la sama termino (v. g. 'morfemo', 'fonemo', 'semantemo') havas malsaman ampleksecon laŭ malsamaj lingvaj skoloj, se ili mem ne starigas proprajn terminojn. Tio validas ankaŭ por la subaj terminoj.

[5] Portugale: "Concretamente, só existem atos linguísticos (***Sprechakte***), só existe o falar (***das wirkliche Sprechen, das Gespräch***), a atividade linguística (***Sprechtätigkeit***); uma atividade que é ao mesmo tempo individual e social, que é por si mesma assistemática, pois que é perpétua criação de expressões inéditas correspondentes a intuições inéditas, e dentro da qual a distinção de um sistema mais ou menos estável não significa comprovação de outra realidade, diferente dos atos linguísticos, mas constitui tão-somente uma necessária abstração científica, em vista de um estudo da linguagem que vá além doo registro e análise dos atos de falar e possa constituir história."

3. Lingvosigno: Signifanto/Signifato

Klasika estas la principo de *arbitreco* de la *lingvosigno*, neapartigebla unuo konsistanta de 'akustika imago' (*signifanto*) kaj 'mensa koncepto' (*signifato*). Tiu arbitro signifas, ke la signo estas nemotivita, sed la uzo fakte dependas de ĝenerala interkonsento de lingvokomunumo. Same konata estas la metaforo pri la ŝakludo, laŭ kiu ŝanĝo en minimuma trajto (*voĉeco* ĉikaze) okazigas ŝanĝon en la sistemo (*langue*), kiu funkcias per 'opoziciaj paroj'. Ekzemploj abundas en la diversaj subsistemoj. Fonologie, venas la koncepto de 'fonemo', kiel minimuma unuo signifodistingiga en vortoparoj, kiaj *peno* kaj *beno* – fonemoj */p/* kaj */b/,* respektive *senvoĉa* kaj *voĉa.* Simile minimumaj opoziciaj paroj ankaŭ okazas en morfosintakso, ekzemple, *knabo* kaj *knaboj*, pri numero, aŭ *knabo* kaj *knabon*, por la funkcioj nominativa kaj akuzativa.

4. Rilatoj sintagmaj aŭ asociaj kaj paradigmaj

Se oni konsideras simplan frazon en Esperanto, konstateblas en ĝia strukturo du aksoj, nome *sintagmo* kaj *paradigmo*, tiu estas, rilatoj *'in praesentia'* kaj *in absentia'*. Estu, ekzemple, la frazo: "La termino 'interlingvistiko' devenas de la indiko *interlingua* en la senso de 'internacia helplingvo'". Sintakse, ĝi havas du ĉefajn terminojn, nome *subjekto* ('La termino interlingvistiko') kaj *predikato* ('devenas de la indiko *interlingua* en la senco de internacia helplingvo'). Se en la subjekto anstataŭ *termino* estus uzata *vorto,* iel simila, restus relative sama la frazo. La rilato inter *termino, vorto, esprimo* estas *asocia* aŭ *paradigma*, t.e., *'in absentia',* tamen la rilato inter ĉiu el tiuj tri lingvosignoj kaj la nukleo de la predikato ('*devenas'*) estas *sintagma*, t.e., *'in praesentia'*. Okazanta en naturaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto tiu rilato montriĝas.

5. Historieco: Sinkronio/Diakronio

Historia evoluo okazas normale kaj en etnaj lingvoj kaj en planlingvo, kia Esperanto. Tio evidentiĝas per komparo de tiuj du specimenoj de teksto: respektive, en praa Esperanto (1878), *Lingwe uniwersala,* kaj jaroj poste en Esperanto, *Lingvo universala:*

Malamikete de las nacjes
Kadó, kadó, jam temp' está.
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá.

Malamikeco de la nacioj
Falu, falu, jam temp' estas!
La tutan homaron em familion
Kununuigi sin devas.

Indas konsideri, kiel rolas la kategorio *tempo* rilate al la centra objekto de la lingvistiko. Tiurilate, grava klarigo venas el Saussure (origine, 2002. In: 2012: 79), kiu distingas la du subajn aspektojn:

1) "*Lingva stato* donas al la studo de la lingvisto unikan centran objeton: rilato de la formoj kaj de la ideoj, kiuj en ĝi enkarniĝas"[6].
2) "*Sekvo de statoj ekzamenontaj* donas al la atento de la lingvisto unikan centran objekton, kiu estas kun la antaŭa objekto ne en rilato de opozicio evidenta kaj abrupta, sed en rilato de radikala malsimileco, nuligante, tuj dekomence, ĉiun specon de komparo, inaŭgurante ordon de ideoj, kiu havas neniun oportunecon naskiĝi antaŭ determinita stato de lingvo"[7]. [Mia libera esperantigo].

La vortoj *nacjes* kaj *nacjoj*, aŭ *kadó* kaj *falu*, montras malsamajn *lingvajn statoj* sekve de la tempo, tamen la *identeco* inter ili daŭras, ĉar la *signifato* de ĉiu paro ne ŝanĝiĝas post la 'elekto' de alia *signifanto.* Ĉiel eblas paroli pri la rolo de tempo sur la lingvo, alivorte, pri la eblo studi lingvajn formojn sinkronie kaj diakronie. Certe tiu distingo gardas rilaton ĉefe al la elekto de aparta perspektivo aŭ metodologio por la studo de lingva ekzemplero.

6. Konkludo

Planlingvoj povas havi aŭ ne strukturon al kiu aplikiĝas tiuj originaj konceptoj de Saussure (1916), ili mem evoluantaj laŭ la evoluo de la saŭsura penso. Per citaĵoj de Saussure (2006), la menciita fakulo Beividas (2008: 350) asertas, ke "la verko saŭsura estas vere la origino de 'mutacio konsiderinda en la evoluo de la disciplino' [lingvistiko], eĉ se sub la tielnomata aspekto memorigita kiel 'rara': tio, ke Saussure 'ne publikis, kion li verkis kaj ne verkis tion, kio publikiĝis sianome'"[8]. [Mia libera esperantigo]. Tamen tiuj principoj certe aplikiĝas al *aposterioraj* lingvoj, kiaj Latino sine fleksiono, Novial, Esperanto, Ido, Interlingua, sed ne al Solresol, pazigrafioj kaj pazilalioj, *aprioraj* lingvoj, filozofaj lingvoj k.t.p.

Malgraŭ la menciitaj *skemismaj* trajtoj de Esperanto, verŝajne la principoj saŭsuraj ĉi tie rapide konsiderataj aplikiĝas al Esperanto kiel plene funkcianta lingvo, kun difinita internacia lingvokomunumo.

Literaturo:

Arrivé, M. (2007): *À la Recherche de Ferdinand de Saussure.* Paris: PUF (Formes Sémiotiques).
Barandovská-Frank, V. (2014): *Interlingvistiko*. Poznano: UAM-RITE
Beividas, W. (2008): Em busca de Saussure. In: *Ágora,* Rio de Janeiro v. XI n. 2 jul/dez. 2008.
Coseriu, E. (1987): *Teoria da linguagem e linguística geral*: cinco estudos. Trad.: Agostinho Dias Carneiro. Rev. Téc.: Carlos Alberto da Fonseca [e] Mário Ferreira. 2 ed. Rio de Janeiro: Presença.
Saussure, F. de. (eld. 2006): *Curso de linguística geral.* Org. [por] Charles Bally, Albert Sechehaye;

[6] Portugale: "Um *estado de língua* oferece ao estudo do linguista um único objeto central: relação das formas e das ideias que nele se encarnam".
[7] Portugale: "Uma *sucessão de estados a examinar oferece à atenção do linguista um único objeto central, que está com o objeto precedente não numa relação de oposição flagrante e abrupta, mas numa relação de radical disparidade, abolindo, logo de início, toda espécie de comparação, inaugurando uma ordem de ideias que não tem nenhuma oportunidade de nascer diante de um determinado estado de língua".*
[8] Portugale: "A obra saussuriana é na verdade a origem de uma 'mutação considerável na evolução da disciplina', mesmo sobre o aspecto lembrado como 'insólito': o de que Saussure 'não publicou o que escreveu e não escreveu o que se publicou em seu nome".

kunlaboro [de] Albert Riedlinger; prefácio da ed. bras. Isaac Nicolau Salum; trad. [de] Antônio Chelini, José Paulo Paes, Izidoro Blikstein. 27 ed. São Paulo: Cultrix, originalo: *Cours de linguistique générale* (1916).

Saussure, F. de. (eld. 2012): *Escritos de linguística geral.* Org. e editado [por] Simon Bouquet [e] Rudolf Engler com a colaboração de Antoinette Weil. Trad. Carlos Augusto Leuba Salum [e] Ana Lucia Franco. 12 ed. São Paulo: Cultrix, originalo: *Écrits de linguistique générale.* (Paris: Gallimard, 2002).

Zamenhof, L. L. (eld. 2007): *Fundamento de Esperanto.* 11 eld. kun Enkonduko, Notoj kaj Lingvaj Rimarkoj de D-ro A. Albault. Pisa, Italujo, Eŭropa Unio: 2007, 1991.

Ricevita 2014-12-20

Adreso de la aŭtoro: Paulo Pereira Nascentes, SHIN CA 5, Bloco I apto.509, Lago Norte, Brasília-DF, Brasil, CEP 71503-505
E-mail: pnascentes@gmail.com
Retpaĝo: http://pnascentes-papocompnascentes.blogspot.com.br/

Introduction to influences of Ferdinand de Saussure on the research field of auxiliary languages (Summary)

After readings and rereadings of his "General language course", CLG (1916, 2006) by various experts, the central ideas of Saussure, would be very useful in studies and research in interlinguistics. As a planned *a posteriori* language, Esperanto borrows elements of existing languages. Thus, it would also apply the principles and famous Saussurean dichotomies. Unique among the various auxiliary languages, because of its *schematism,* present in the correlative table, Esperanto deserves inquiry by its peculiarities of agglutinant language and by the word formation system, which would favor the many Asian and non-European, in his own ethnic languages. After commenting on the inevitable evolution of all languages according to the *principle of arbitrariness* of the linguistic sign, Saussure (2006: 91) argues that even in planned languages this principle must necessarily be worth, because *"who creates a language, has it under the control as it does not come into circulation; but from the moment that it fulfills its mission and becomes possession of all, it flee you to control. Esperanto is a test of this kind; to succeed, escape the fatal law?"*. This line of research is shown full of possibilities, because: (1) the CLG (1916) until today surprises the skilled reader by his infinite potential to generate new interpretations, beyond the discovery in 1966 of new manuscripts of Saussure, published in 2002 with the title of "General linguistic writings"; (2) remain important the "dichotomies of Saussure" and interpretations of psychoanalysis, linguistics, semiotics, authors as Freud, Saussure, Hjelmslev, Lacan. These principles should not be overlooked in the issue of planned languages, essential field of work of interlinguistics and (3) the *principle of arbitrariness* of the linguistic sign would go from the 'meaning' into the 'significant' and would have an important role in both linguistic creation as the construction of languages planned a posteriori, as Interlingua, Occidental and Novial.

grkg / Humankybernetik
Band 56 · Heft 2 (2015)
Akademia Libroservo / IfK

Die Zeichenrelation als Systemrelation

von Alfred TOTH, Tucson, AZ (USA)

1.
Jedes Subzeichen kann nach Bense (1986, S. 50) sowohl statisch als auch dynamisch fungieren, d.h. als Entität oder als Prozeß, der als Semiose bezeichnet wird. Entsprechend kann man die peircesche Zeichenrelation entweder entitätisch durch
$Z = (M \rightarrow ((M \rightarrow O) \rightarrow (M \rightarrow O \rightarrow I)))$
oder semiosisch durch
$Z = ((M \rightarrow O) \rightarrow ((O \rightarrow I) \rightarrow (M \rightarrow O \rightarrow I)))$
definieren.

Seit Bense (1979, S. 53 u. 67) wird nurmehr die entitätische Definition gebraucht. Die semiosische hingegen dominiert Benses frühes semiotisches Werk (vgl. z.B. Bense 1971, S. 77 ff.; 1975, S. 88 ff. u. 109 ff.). Beide Zeichendefinitionen können schließlich seit Bense (1981, S. 124 ff.) kategorietheoretisch redefiniert werden, wobei die Morphismen zwischen den Fundamentalkategorien wie folgt definiert sind:
$\alpha := (.1. \rightarrow .2.)$
$\beta := (.2. \rightarrow .3.)$
und folglich haben wir weiter die konversen
$\alpha° := (.2. \rightarrow .1.)$
$\beta° := (.3. \rightarrow .2.)$,
die komponierten
$\beta\alpha = (.1. \rightarrow .3)$
$\alpha°\beta° = (.3. \rightarrow 1.)$
sowie natürlich die drei identitiven Morphismen
$id_1 = (.1. \rightarrow .1.)$
$id_2 = (.2. \rightarrow .2.)$
$id_3 = (.3. \rightarrow .3.)$.

2.
Nun kann man die Systemrelation wie folgt definieren:
$S = [R[O, T], [[R[T, S], R[O, T, S]]]$,
worin O das Objekt, T das Teilsystem und S das System bezeichnet (vgl. Toth 2015), d.h. wir haben die ontisch-semiotischen Teilisomorphien
$R[O, T] \cong R[M, O]$
$R[T, S] \cong R[O, I]$
$R[O, T, S] \cong R[M, O, I]$,

und deshalb

$Z = ((M \rightarrow O) \rightarrow ((O \rightarrow I) \rightarrow (M \rightarrow O \rightarrow I)))$

$\cong$

S = [R[O, T], [[R[T, S], R[O, T, S]]].

Allerdings ist es so, daß wir bislang nicht von S als minimaler systemtheoretischer Einheit ausgegangen waren, sondern seit Toth (2012) gilt

S* = [S, U],

oder anders gesagt: S hat keine Umgebung, es sei denn, es erscheine in S* eingebettet. Daraus folgt unmittelbar die in Toth (2015) gegebene Definition der Systemrelation

S* = [R[O, T], [[R[T, S], R[S, S*]]],

deren Isomorphie mit der Zeichenrelation vermöge der Teilisomorphien

Z* = [R[M, O], [[R[O, I], R[I, I*]]]

ergäbe.

Nun gilt für I, da es per definitionem eine triadische Kategorie ist

I = Z,

und daher haben wir sofort

Z* = [R[M, O], [[R[O, I], R[I, Z*]]]

mit den neuen Teilisomorphien

R[O, T] ≅ R[M, O]


R[T, S] ≅ R[O, I]


R[S, S*] ≅ R[I, Z*].

Es handelt sich somit sowohl bei S* als auch beim ihm nun isomorphen Z* um pseudo-tetradische Relationen, daS* = U[S]

Z* = U[Z = I]

gilt. Wir gehen also von einem neuen Zeichenmodell aus, das in eine Umgebung eingebettet erscheint, etwa so, wie in den folgenden Schemata dargestellt:





Nach Benses Bestimmung des Zeichens als Differenz paarweiser "Umweltsysteme" (Bense 1975, S. 134)

$Z \equiv \Delta(U_i, U_j)$

erzeugt das Zeichen Umgebungsdifferenzen, und umgekehrt wird nach Benses situationstheoretischer Zeichendefinition (vgl. Bense 1971, S. 84 ff. u. 1983, S. 156 ff.) das Zeichen als Funktion von Umgebungen eingeführt

$Z = R(Z, Sit_i, Sit_j)$,

d.h. das Zeichen wirkt einerseits umgebungserzeugend und wird andererseits durch Umgebungen erzeugt, es gibt somit eine bijektive Abbildung von Zeichen als Systemen auf ihre Umgebungen.

Schrifttum

Bense, Max (1971): Zeichen und Design. Baden-Baden

Bense, Max (1975):Semiotische Prozesse und Systeme. Baden-Baden

Bense, Max (1979): Die Unwahrscheinlichkeit des Ästhetischen. Baden-Baden

Bense, Max (1981): Axiomatik und Semiotik. Baden-Baden

Bense, Max (1986): Das Universum der Zeichen. Baden-Baden

Toth, Alfred (2012): Systeme, Teilsysteme und Objekte I-IV. In: Electronic Journal for Mathematical Semiotics, Bd. 6/1-4, 2012

Toth, Alfred (2015):Grundlegung der ontisch-semiotischen Systemtheorie. In: Electronic Journal for Mathematical Semiotics, Bd. 9/2 2015, S. 1-8

Eingegangen 2015-02-15

Anschrift des Verfassers: Prof. Dr. Alfred Toth, 8225 East Speedway, Apt.1013, Tucson, AZ 85710, USA

Mail: semtechlab@aol.com

Sign relation and object relation (Summary)

Sign relation and object relation are reduced to a system relation, procedure which allows to differentiate between inner and outer environment of the sign relation in a homogeneous underlying theoretical framework (without abolishing 2-valued logic as a basis of both semiotics and ontics).

Duobla rikolto por la Internacia Kongresa Universitato en Lillo

Senprecedence granda nombro da proponoj por la Internacia Kongresa Universitato (IKU) alvenis ĉi jare responde al la kutima alvoko de UEA. ĝis la limdato fine de januaro mi ricevis kvardek proponojn, preskaŭ duoble ol la kutima nombro, kaj preskaŭ trioble ol la nombro en la du antaŭaj jaroj. El tiu nombro dek unu estis ankaŭ proponoj por kursoj en la komuna sesio de IKU kaj Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), kompare kun 3-4 en antaŭaj jaroj.

La disdivido de la temoj estis tre varia: ok proponoj pri lingvistiko, kvar pri kemio au biokemio, po tri pri arto, literaturo, informadiko kaj Esperanto/Movado, kaj po du rilataj al medicino, fiziko, ekonomio, religio kaj historio. El la 40 proponoj nur ses venis de virinoj, pli malpli la kutima proporcio, sed la geografia disdivido estis malpli kutima: pli ol duono de la proponintoj loĝas ekster Eŭropo. Estis ankau pli alta ol kutime procentajho de proponintoj novaj en IKU.

Por efike utiligi tiun eksterordinaran oferton de la scienca komunumo de Esperantujo, kaj por omaĝi la jubilean UK-n mi proponis al la estraro de UEA aldoni al la kutimaj IKU-prelegoj ankoraŭ 10-12 pli mallongajn prelegojn kadre de 2-3 sesioj de novtipa "Scienca Kafejo", malpli formala aranĝo unue provita en Bonaero. La aldonaj prelegoj ankaŭ povas aperi en la IKU-libro, la kolekto de ĉiuj tekstoj de la IKU-prelegoj, kiu estas la akademia produkto de la IKU-sesio kaj aperas papere dum la UK ekde 1997, kaj ekde 2005 regule ankaŭ rete. Efektive, la jubilea kongreso en Lillo markas ankaŭ la 20-jaran jubileon de la AIS-IKU komunaj sesioj (dum la UK en Tampereo en 1995 la AIS-IKU sesioj estis inaŭguritaj per kurso pri Astronomio kaj Astrofiziko komune prezentita de M.Maitzen kaj A.Wandel).

Dum pli ol monato la 6-kapa IKU-komisiono (profesorino Sabine Fiedler, germana lingvistino, Hans Michael Maitzen, aŭstra profesoro pri astronomio, Humphrey Tonkin, usona profesoro pri literaturo, José Antonio Vergara, ĉilia kuracisto, Amri Wandel, israela profesoro pri astrofiziko, kaj Wen Jingen, ĉina aŭtoro kaj tradukisto) profesie konsideris la resumojn de la 40 proponoj kaj la biografietojn de la aŭtoroj. ĉiuj komisionanoj voĉdonis individue lau anticipe interkonsentitaj kriterioj de faka nivelo, tema diverseco kaj intereso, lingva nivelo ktp.

Pri la propraj kriterioj asertas IKU-komisionanino Sabine Fiedler: "se ni prenas la perspektivon de ekster la E-movado, IKU/AIS estas la terenoj de aplikado de Esperanto en sciencoj. Mi volas aŭskulti pri energio, enzimoj, plantoj, inventaĵoj, eble ankaŭ pri aŭtoroj kaj aliaj lingvoj, sed ne nepre pri Esperanto (kiel en la plimulto de la aliaj programeroj de la UK). Ni volas montri al la mondo, ke Esperanto taŭgas kiel komunikilo, sed oni preskaŭ nur uzas ĝin por paroli pri Esperanto".

La unuopajn voĉdonojn la IKU-sekretario sumigas por produkti la liston de rekomenditaj prelegoj por la estraro de UEA, kiu findecidas pri la IKU-prelegantoj. Kutime estas en la listo 9-10 IKU-prelegoj, inter ili 3 IKU-AIS kursoj, ĉi jare la listo estas duoble pli longa, konsistanta el la 20 plej taŭgaj prelegoj (ĉ. duono por IKU kaj duono por Scienca Kafejo).

Estas interese kompari la procentaĵon de virinoj kaj ekster-eŭropanoj en tiu listo al la supre menciita procentaĵo el ĉiuj proponoj. Inter la 20 unuaj lokoj estas tri virinoj, tio estas proporcie 15%, sama al la proporcio de la virinoj inter ĉiuj 40 proponoj. Pri ne-eŭropanoj estas surpriza rezulto: inter la 20 unuaj lokoj dek kvin (75%) estas ne eŭropanoj, kompare al 21 (55%) inter ĉiuj proponoj.

La resumoj de la elektitaj proponoj aperos en la IKU-paĝo en la nova retejo de UEA: http://www.uea.org/kongresoj/universitato, kie troviĝas ankaŭ la resumoj de la pasintjaraj IKU-prelegoj kaj IKU-libroj.

Amri Wandel
IKU-sekretario

originale publikigita en: Esperanto 1290(4), aprilo 2015, p. 77

Familia nomo	*Persona nomo*	*Temo*	*Prelega speco*	*Titolo*
Barandovská-Frank	Věra	Filozofio	IKU	Dialogo pri valoroj ĉe Alain de Lille
Bronŝtejn	Mikaelo	Literaturo	IKU	Min trafis feliĉ' esti rusa poeto. Rusoj en Esperanto-poezio
Brosch	Kirilo	Lingvistiko	IKU	La hitita lingvo: ĉu "filino" aŭ "fratino" de la prahindeŭropa?
Glatigny	Pascal	Arto	IKU	La lingva demando en la nuntempa arto
Gobbo	Federico	Komputiko	IKU	Kien iras artefarita inteligenteco? Malfermaj etikaj problemoj
Larsson	Hannes	Metalurgio	AIS-IKU	La rezisto de materialoj kaj strukturoj
Mak	Bill	Historio/religio	AIS-IKU	La Budhisma Kosmo
Raola	Orlando	Biokemio	IKU	Nuntempaj esploroj pri la ekesto de samkiraleco en molekuloj devenantaj el vivestaĵoj
Wandel	Amri	Fiziko	AIS-IKU	La revolucio de Einstein: jubileo de la Teorio de Relativeco 1915-2015
Wendel	Teles Pontes	Kemio	IKU	Kemio, bildoj kaj informoj en la dialogo inter specioj
Adonis	Saliba	Medicino	SK aŭ alia	Produktado de radioizotopoj por nuklea medicino
Astori	Davide	Lingvistiko	SK aŭ alia	Lingvoj, valoroj, kulturoj, mondokonceptoj en dialogo: Schola Saleri
Boyadzhieva	Eva	Medio	SK aŭ alia	La Ekvilibro
Brewer	Steven	Historio	SK aŭ alia	Historio kaj estonteco de mondaj interretaj ludoj
Dasgupta	Probal	Lingvistiko	SK aŭ alia	La interkultura dialogo kaj ĉu loĝejoj ne estas en loĝejejo?
Koutny	Ilona	Lingvistiko	SK aŭ alia	Ĉu esperanto havas specialan lingvan bildon de la mondo?
Rao	Giridhar	Lingvistiko	SK aŭ alia	La angla en Barato: edukado, justeco kaj tutmondiĝo
Sadan	Tsvi	Religio	SK aŭ alia	La kaŝita maro de la Talmudo: Gvidilo por la perpleksigitaj (Esperantistoj)
Shirakawa	Yuma	Biologio	SK aŭ alia	Taksonomio – esploro en nova kaj malnova kampo de biologio
Traunmüller	Hartmut	Lingvistiko	SK aŭ alia	La plej disvastiĝintaj vortoj